

Boletín

Federación Española de Esperanto
Asociación de Utilidad Pública



La valencia urbestrino, Rita Barberá, salutas en Esperanto

N-ro 332 • julio - oktobro 1997

Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Aperanta de 1949

Ĉefredaktoro

Miguel Gutiérrez Adúriz
Los Coferos 1-C, 2-I
ES-39600 Muriedas
Cantabria
liven@nexo.es

Redaktoroj kaj kunlaborantoj

Salvador Gumá Clavell
Miguel Fernández Martín
Vicente Hernández Llusera
Andres Martín González
Luis Serrano Pérez
Antonio Valén Fernández
Antonio Marco Botella

Hispana Esperanto-Federacio

Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Es-28015 Madrid

Tel.+faksilo: +34-(9)1-446-80-79

esperanto@adv.es

<http://home.adv.es/esperanto>

Estraro

Prezidanto: Miguel Ángel Sancho
Viceprezidanto: José M. Gialofré
Sekretario: Manuel Parra Benito
Vicesekretario: Marcos Cruz Martín
Kasisto: Pedro Garrote
(konto: 14.011.966, Caja Postal)
Voĉdonantoj:
Luis Hernández García
Augusto Casquero de la Cruz
Miguel Gutiérrez Adúriz

Noto: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. La redaktoro rajtas rifuzi ne petitajn artikolojn.

Enhavo

Miguel Ángel Sancho Pardo, Prezidanto de HEF	2
Pri ni (<i>Miguel Gutiérrez</i>)	4
Pri Boletín (<i>Miguel Gutiérrez</i>)	6
56a HK kaj 7a Internacia E-kongreso	7
Ordinara Ĝenerala Kunsido	11
De Prezidanto al Prezidanto	12
Kio pri ILEI? (<i>Johano de Valencio</i>)	13
Iom pri la UK	14
Iom pri la 53 IJK	15
Ĉirkaŭ la mondo	16
Pelmele	23
Korespondemaj	25
Lirikaj Perloj de Al Andalus, kelkaj rimarkoj pri la libro (<i>Bernard Golden</i>)	26
Respondo al Bernard Golden pri la libro "Lirikaj perloj" (<i>Antonio Marco</i>)	28
Nekrologo	31
Literatura Konkurso de Fundación Esperanto	32

Miguel Ángel Sancho Pardo

Prezidanto de HEF



Multaj el vi, estimataj membroj de HEF, apenaŭ konservas en via memoro mian nomon, aŭ simple ne konas ĝin. Fakte mi estas malnova esperantisto, ĉar jam de du jardekoj mi parolas nian lingvon, kaj tamen nova, ĉar dum kvar jaroj mi havis nenian rilaton al la movado. Tiu nevola retiriĝo permesis al mi vidi nian aferon el pli fora vidpunkto kaj akiri, tio estas mia opinio, pli ĝustan perspektivon. Antaŭ unu jaro mia vivo trafis favorajn cirkonstancojn kaj mi ekemis reveni en la Esperantan movadon, ĉar nia lingvo estas hejmo, kie mi ĉiam sentas min komforte.

Unujara kunlaboro ne sufiĉas por plena juĝo pri la taŭgeco de homo. Tamen la eksestraro rigardis min bona ŝanco por prezidant-kandidatiĝo, kaj la membroj ĉeestantaj la pasintan Ĝeneralan Asembleon de HEF akceptis la proponon.

Miaflanke mi konsentis kun peno kaj duboj. Fakte miaj profesiaj kaj personaj devoj ne permesas aldoni tro multajn taskojn al mia jam peza vivagendo kaj sentas, ke eble aliaj pli taŭgaj homoj, certe troveblaj en nia movado, povus pli efike estri nian asocion. Tamen la aferoj devenis tiel, kaj mi akceptas tiun ĉi novan situacion en mia vivo kiel defion. La jam pruvita sperto kaj kunlaboremo de la antaŭa skipo, kiu plejparte restas en la nuna, decidigis min.

Komence de nova estrarperiodo, pezas la respondeco daŭre teni la atingojn de la pasintaj kaj la devo ilin plibonigi. Ni klopodos fari nian eblon.

La Ĝenerala Asembleo publike dankis al Antonio Alonso pro lia sindonemo kaj konstanta laboro por nia organizaĵo dum multaj jaroj. Ankaŭ mi deziras esprimi al li mian personan dankon. Li scias ke mi sincere bonvenos lian opinion kaj kunlaboron.

La ĉefaj agadlinioj por la venontaj kvar jaroj baziĝas ĉefe sur ĝenerala procezo, jam preskaŭ finita de la antaŭa estraro,

kies celo estas normaligi kaj modernigi nian asocion ĝis ĝia funkciado similos al tiu de aliaj neregistaraj organizaĵoj. Nun ni ellaboras konkretajn agadplanon kaj buĝeton por 1998, kies celo estos ĉefe la renovigo de la eldonaĵoj, la disvastigo de la perkoresponda kurso kaj la partopreno en fakaj publikaj eventoj kiel Expolingua.

Kompreneble la fina celo estas la kresko de la membraro per plibonigo de la servoj, tamen kun granda zorgo rilate al la financa stabilo de la asocio.

Mi esperas ke, dum la venontaj jaroj, mi povos koni vin ĉiujn, kaj aŭskulti viajn ideojn kaj personajn spertojn. La estraro taksas grava ĉies kunlaboron. Kiel membro vi ne povas ludi la rolon de simpla spektanto. Via laboro, eĉ se eta, aldoniĝas valore al la kolektiva strebado. Ricevu do mian plej sinceran saluton kaj antaŭdankon.

3

Nova Estraro

La Ĝenerala Kunveno de HEF en Valencio elektis per nul kontraŭaj, 5 sinde-tenaj kaj 27 favoraj voĉoj novan skipon de homoj por estri la Asocion dum la venontaj kvar jaroj. Jen la nova Estraro:

Prezidanto: Miguel Ángel Sancho

Vicprezidanto: José María Galofré

Sekretario: Manuel Parra

Vicsekretario: Marcos Cruz

Kasisto: Pedro Garrote

Voĉdonantoj: Augusto Casquero, Miguel Gutiérrez Adúriz, Luis E. Hernández

Konsila Komitato Ana Manero, Juan Antonio Cabezas, José María Rodríguez

HEF bonaj servoj


50



En 1997

HEF bonaj servoj





Pri ni

Miguel Gutiérrez Adúriz

Redaktoro de Boletín

Dum multaj, multaj jaroj la mondo fukciis laŭ tre difinitaj modeloj. Dum jardekoj kaj jardekoj preskaŭ nenio ŝanĝiĝis. Ankaŭ la hispana e-movado vivis en tiu trankvila situacio. Ĝia strategio konsistis preskaŭ nur en la pacienca atendo, ke la ĝenerala socio alproksimiĝu al ĝi.

La sinteno de la hispana e-movado, al kiu ni ĉiuj pli-malpli apartenas, estis iom pasiva atendo. Ĝi atendis ke la lernantoj venu. Ĝi atendis ke la kursfinintoj aliĝu al ĝiaj societoj. Ĝi atendis la intereson de la ĵurnalistoj... ktp, ktp. Cetera niaj grupoj, naskiĝintaj laŭ deknaŭjarcentaj idealoj, apenaŭ celis kunigi la parolantojn de la lingvo, kreante plimalpli homogeneajn grupojn de "samideanoj".

Tiu sinteno, kaj la kutimo instrui la lingvon ĉefe al "maturuloj", ne zorgante la novajn generaciojn, kondukis la hispanan e-movadon al sak-strato, kaj por pli gravigi la situacion, subite la mondo freneziĝis kaj multaj aferoj komencis bruske ŝanĝiĝi. Meze de la kaoso, la movado ne kapablis, ne sciis reagi.

Antaŭ 8 jaroj, malgranda grupo konsistanta el junaj, kaj ne tiom junaj, homoj de nia movado decidis dizajni novan pli modernan kaj adekvatan strukturon por

HEF. Kaj jen, kiel rezulto de ilia granda kaj sindona laboro, nun, tagon post tago, eblas jam rikolti etajn sed pozitivajn fruktojn.

La nova politiko de la estraro estas klara: ĝi volas ricevi kiel eble plej altan rendimenton el ĉiuj siaj fortoj: el sia lokalo en Madrido kaj el la homoj kiuj, dise en la tuta Hispanio, konsistigas la Federación.

Por atingi tion, la antaŭa estraro de HEF difinis du agadkampojn: Unue flegi kaj plibonigi siajn kutimajn servojn al la membraro, tio estas la provizado de libroj, kasedoj, kompaktdiskoj kaj vidbendoj pere de la Libro-servo, kaj ankaŭ la informadon pere de sia bulteno, Boletín, kiu aperas regule kaj ĉiam kun pli kaj pli moderna kaj profesia aspekto.

La dua agadkampo celis la kreon de kiel eble plej stabila strukturo por la asocio. Tial HEF modernigis sian lokalon, transformante ĝin ne nur en veran oficejon, sed ankaŭ en la hejmon de la hispana E-movado. HEF plene ŝanĝis la ĝeneralan aspekton de la ejo, kaj poste aĉetis ĉiujn necesajn aparatojn: telefonon kun aŭtomata respondilo, faksilon kaj modernan komputilon kun modemo kaj retadreso en Internet.

Kompreneble, bela lokalo, mebloj kaj modernaj aparatoj estas nuraj materiaj instrumentoj, do HEF faris ĉiujn nece-

sajn paŝojn por doti sin per novaj pli adekvataj gvid-instrumentoj. Tial la nova estraro ŝanĝis la statutojn de la Asocio kaj de ĝia fondaĵo, Fundación Esperanto, aprobis Strategian Planon, kaj starigis kompletan librotenanadon laŭ oficiala sistemo.

La ekstera rekono al la daŭra strebado de HEF venis de la Registaro de nia lando, kiu, en Kabineta Kunveno en 1993 deklaris HEF «Asociación de Pública Utilidad».

Neniam antaŭe HEF ĝuis similan rekonon. Neniam antaŭe HEF estis tiel bone ekipita. Junaj homoj laboregas en la Centra Oficejo. Jes ja, ili laboras multe sed kontente, ĉar ili konstatas ke la laboro farata ne estas vana. Ĉiutage ili konstatas daŭran progreson en la difinitaj celoj. Danke al tio HEF posedas aktualigitan datenaron de ĉiuj membroj de la asocio, simpatiantoj kaj eĉ personoj kiuj montris intereson al Esperanto. Jam de du jaroj HEF peras la revuon Eventoj kaj la kotizojn por UEA, por ĝiaj revuoj kaj por la Universala Kongreso.

La Centra Oficejo de HEF fariĝis krome la ejo de granda Biblioteko, kiun ricevis la nomon Juan Régulo. Tiu biblioteko gardas librojn, ĵurnalajn artikolojn pri esperanto aperintajn en ĉiuj regionoj de nia lando, kaj ankaŭ “fotobankon”.

Nu, estas klare ke, la gvidantoj de HEF ne plu atendis ke oni bonvole aliĝu al la «Federacio» por helpi la e-movadon. Ne. Nun HEF scias ke moderna

asocio devas oferti kiel eble plej ampleksan faskon da servoj al siaj eventualaj membroj. Ju pli da servoj HEF kapablos oferti, des pli da homoj interesiĝos pri sia aliĝo al tiu asocio. Ĝuste pro tio HEF daŭre laboras en la direkto provizi siajn membrojn per kiel eble plej multe da bonaj servoj.

Nuntempe ĉiu membro de HEF ricevas senpage la bultenon de la asocio «Boletín» kaj aliajn bonajn servojn kiel peradon de kotizoj por diversaj revuoj, Radio Informa Servo kun plej freŝaj novaĵoj pri esperanto en radio (horarojn, frekvencojn, novaĵojn, programojn...). De antaŭ monatoj, la kolektivaj membroj regule ricevas diversajn informojn, por helpi ties laboron, ekzemple informilojn, aniĝilojn, leterojn ktp. La plej junaj membroj (ĝis 12 jaroj) ricevas ankaŭ senpage la revuon «Juna amiko» eldonita


de ILEI en Hungario. La junuloj inter 13 kaj 30 jaroj ricevas regule kaj senpage interesajn

informojn aparte de Boletín (informilojn, cirkuletojn, aniĝilojn, ktp), kaj krome ĉiujn numerojn de la junularaj revuoj «Kontakto» kaj «Koncize».

La fruktoj de ĉi nova agado estas ja pozitivaj kaj oni povas diri kun kontento ke la nombro de junaj membroj de HEF kreskis tiel ke,

en la jaro 1996, ĝi duobliĝis.

1997 estas jubilea jaro por HEF. Ĝi festas sian 50-jariĝon. La eniro en tiun festan jaron okazis sub la muziko de disko kiu ĉiutage diskonigis nian lingvon



pere de la televido kaj la muzikaj radios-
tacioj de nia lando. Neniam antaŭe estis
tiel granda informo kampanjo pri Espe-
ranto. Kaj kvankam HEF ne estas la ĉefa
respondeculo, la kampanjo estis ekster
niaj monkapabloj, la Asocio povas fieri
ke, laŭ siaj ebloj, ĝi kompetente partopre-
nis en la ellaborado de la projekto.

1997 estas jubilea jaro de HEF kaj,
por festi tiun eventon, la estraro mendis
de profesiaj dizejnistoj propran distingon
simbolon, kun la celo prezenti la Federa-
cion al la ĝenerakla publiko per kiel eble
plej moderna kaj trafa bildo.


Kun siaj novaj servoj kaj simbolo,
HEF ekmalfermis sin al la tuta mondo
pere de la plej moderna teknologio: ĝi
lanĉis siajn profesi-nivelajn TTT-paĝojn
en la Interreto (Internet). Sed, komprene-
ble, la Asocio daŭre flegas la informadon
per la kutimaj rimedoj kaj tiucele eldonis
inform-kajeron.

Cetere, HEF sukcesis kunigi ĉies in-
teresojn por ke la eldonejo Sopena reel-
donu la poŝvortaron *Lexicon-Sopena*.
Dume la Federacio jam preparas propran
poŝvortaron pli modernan.

Komence de la jaro 1997a, HEF
lanĉis sian Perkorespondan Kurson, kiu
konsistas el lernolibro, paĝaro aŭ kom-
putila disketo kun ĉiuj ekzercoj de la
kurso, informlibro kaj kasedo kun ĉiuj
legajoj.

Neniam antaŭe la hispana e-movado
havis je sia dispono tiom multe da rime-
doj por disvolvi ampleksan kaj ambician
projekton de agado. Sendube. Sed, kvan-
kam la plej multo el la estrara laboro
estas disvolviganta, ankoraŭ mankas tre
grava, grava flanko... kreskigi la nom-
bron de la esperanto-parolantoj.

La tasko defie staras ne nur antaŭ la
nova estraro, sed ankaŭ antaŭ ni ĉiuj. Do,
ni paŝu kune sub la ŝirmo de forta Hispa-
na Esperanto-Federacio.



Miguel Gutiérrez Adúriz

Jen ni staras antaŭ nova etapo de Bo-
letín. Nu, se diri la veron, ĉi nova etapo
estas grandparte daŭrigo de la antaŭa. Ja
la nuna redaktoro kompostis la bultenon
dum la lastaj jaroj. Sed, kvankam unua-
vide la leganto ne konstatos rimarkindajn
ŝanĝojn de la ĝenerala aspekto, ni klopod-
os altigi, eĉ se nur iomete, la kvaliton de
la grafikaj elementoj. Fakte la dispone-
blaj monrimedoj ne permesas riskajn pi-
ruetojn.

Rialte al la enhavo, Boletín ne estos
areno por personaj disputoj sed por in-
terŝanĝoj de ideoj. Kompreneble, la re-
daktoro rezervas al si la rajton ne publi-
kigi ne petitajn artikolojn kaj ni klopodos
ke la lingva nivelo de la proponitaj arti-
koloj plu estu bona.

Cetere, konscia pri tio ke ni vivas en
la tempo de la informado, la redaktoro
dediĉos plej grandan spacon de la bulte-
no al la tasko informi la legantojn pri la
agado de nia Asocio, HEF, pri la e-mo-
vado ĝenerale kaj pri ajna ekstermovada
novaĵo iel koncernanta al nia kulturo.

56a HK

7a Internacia Esperanto-Kongreso

7

De la 8a ĝis la 13a de julio 1997, okazis en Valencia la 56a Hispana Kongreso de Esperanto kune kun la 7a Internacia Esperanto-Kongreso, aŭspicita de Monda Turismo, kaj la 7a Eŭropa Esperanto-Forumo sub la Honora Prezidanteco de la Reĝino de Hispanio, Sofia.

La sidejo estis la Fakultato pri Filologio de la Universitato de Valencia, kies estraro ne nur afable gastigis la kongresojn, sed ankaŭ aŭspicis ilin, ofertante senpage ĉiun bezonatan servon. La dekanino de la Fakultato mem, D-ino Carmen Morenilla, aktive partoprenis la organizadon.

La kongreson kunordigis Augusto Casquero, Ana Montesinos, kaj Gian Carlo Fighiera, kaj ricevis la valoran kunlaboron de pluraj samideanoj: gesinjoroj Sempere, Aliaga, Peris, Giménez, Solag, Eduardo, Berta, Raposo, Antonio, Rafa, Araceli, Añó, ktp.. Entute aliĝis 565 gekongresanoj, el 18 landoj, sed fakte partoprenis pli ol 600.

La unuan tagon de la kongreso, je la 11a horo komenciĝis la disdonado de la kongresa dokumentaro kaj malfermiĝis la libroservo, ĉi-jare tre ampleksa ĉar UEA sendis grandan stokon de libroj. Duonhoro poste malfermiĝis la filatela ekspozicio kaj ekkunsidis la estraro de HEF, kiu devis fari paŭzon je la 12.30,

por akcepti regionajn ĵurnalistojn ĉe la gazetara konferenco. Fine de ĉi-lastaprogramero, la estraro plu kunvenis ĝis la manĝo-paŭzo je la 14a horo.

En la posttagmezo, je la 16a horo komenciĝis la kurso de E-o laŭ Cseh-metodo. Tamen la buso, per kiu venis al Valencio s-ro Anton Zacharias el Slovakio, ne alvenis ĝustatempe, kaj s-roj José Año kaj José de las Heras prenis sur sin la respondecon informi la ĉeestantojn pri la metodo, kaj pri kelkaj reguloj de la lingvo.

Je la 17a horo okazis debato pri "La lingvoj de Hispanio", kunordigita de la HEF-prezidanto, Antonio Alonso. Poste, riveroj da *sangria* helpis varmigi la etoson en la Interkona vespero kaj je la 19.30 pluraj grupoj de kongrsanoj faris perpiedan viziton al la urbo, dum aliaj profitis la senpagan bileton donacitan de la organizantoj por viziti diskotekon.

Kiel ĉiutage laŭlonge de la tuta Kongreso, jam je la 9a horo oni povis aĉeti la lastajn novaĵojn en la libroservo.

Je la 10a okazis la solena Malfermo. Post la kutimaj paroladoj kaj salutoj de esperantistoj el 22 landoj, ludis la studenta Koruso de Malnova Kanto el Bidgoszcz (Pollando). La salonego estis plenplena.

Venis poste interesa festparolado d-

ino Rafaela Urueña “Sur la vojo al unueca eŭropo: problemoj kaj defioj”, kaj disvendado de sia libro, “ABC de la Eŭropa Unio. Enkonduko en la Eŭropan Juron”, eldonita de la Universitato de Santiago por la Preuniversitataj Kursoj.

Je la 12a oni prezentis filmon en Esperanto, kaj je la 13.30 grupo de delegitoj kaj reprezentantoj vizitis la Urbodomon, kie la Urbeŝtrino de Valencia, Rita Barberá, ne nur akceptis ilin, sed ankaŭ, post legado de saluto en Esperanto, regalis la kongresanaron per abunda lunĉo.

Je la 16a okazis la poŝta kongresa stampado kaj, kiel ĉiutage, la kurso de E-o laŭ Cseh-metodo, jam sub la gvido de la antaŭanoncita instruisto. Je la sama horo prelegis s-ro Gian Carlo Fighiera el Italio pri “Esperanto preter la jaro 2000 (lingvo kaj movado)”. Je la 17a, s-ro Augusto Casquero prelegis kaj prezentis lumbildojn en la kunveno de la partoprenontoj en la Pilgrimado al Santiago de Compostela.

Je la fino de la tago okazis la Pola Vespero kun prezentoj de junular-palaca folkloro “Plomienie”, la infana Teatro Szubin “La eta princo”, la muzik-ensemblo “ANDA” kaj la popol-ensemblo “Paluki”.

La trian tagon de la kongreso, la pola karavano dediĉis al ekskursado. Dume, en la mateno, en la kongresejo okazis prelego kun kolokvo pri “Instruado

de Esperanto laŭ cseh-metodo” fare de Anton Zacharia, kaj praktika prezentado de “Japana terapio masaĝo Yumaiko”



Marco kaj Alonso,
du grandaj esperantistoj

fare de Sigita Staissiunaite el Litovio.

Jam en la posttagmezo, Jesús de las Heras, akompanate de gitar-ludoj, prelegis pri “La muziko de Fernando Solo”, kaj s-ro Milan Zvara el Slovakio, helpe de lum-bildoj, prelegis pri “Mikologio kaj fungokolektado en centra Eŭropo”.


Kronis la tagon la Internacia Arta Vespero preparita de niaj rumanj samideanoj, la elektronika muziko de E. Vargas Gutiérrez (Solo), kaj la “Danubaj voĉoj”. Kompreneble, ĉiuvespere, kiam la suno jam estis for, grupoj de esperantistoj kunvenis en la terasoj de la valenciaj trinkejoj por vespermanĝi kaj agrable besedi.

En la kvara tago multaj estoj ekskursis al Elche kaj Benidorm. Dum en la Fakultato

de Filologio okazis ege interesa kunveno kun la profesoroj de la Fakultato de Filologio, la dekanino, d-ino Carmen More-



Andrzej Grebowski



Camacho kaj Fernández,
aliaj du grandaj esperantisto

nilla, kaj laborgrupo de kongresanoj (Rafaela Urueña, Jorge Camacho, Miguel Gutiérrez, Ana Montesinos, Jesús Raposo, Andrzej Grebowki).

Denove skuis la korojn nia eksterordinara poeto, novelisto kaj eseisto Miguel Fernández per sia prelego "Sur la ŝpuroj de Federico Garcia Lorca". Poste Barbara Pietrzak, Redaktorino de Pola Radio, parolis pri "Esperanto en radio", kaj Maritza Gutiérrez el Kubo prezentis allogan prelegon pri "La poetika arto de José Martí".

Fine de la mateno prelegis Andrzej Grebowski, prezidanto de Monda Turismo pri "Internacia Esperanto turismo".

En la vespero, post korpreama omaĝo al Ada Fighiera (unu el la kongresaj salonoj havis ŝian nomon) kaj Juan Carlos Ruiz Sierra, okazis la Hispana Vespero, kun la partopreno de "Centro Aragonés".



Maritza Gutiérrez

La sabaton, 12an de julio, la Kongreso vojaĝis al la urbo Cheste por omaĝi tiun loĝantaron historie ligita al la Esperanta Movado de antaŭ preskaŭ unu jarcento.

Je la 9a matene, la polaj aŭtobusoj ekiris plenplenaj de gekongresanoj. En Cheste ilin ĝentile akceptis la lokaj e-istoj. Kelkaj partoprenis eksterprograme en la katolika diservo, aliaj vizitis la urbon. Poste ambaŭ grupoj renkontiĝis en la teatro, kie okazis la oficiala akcepto, por aŭskuti prelegon de Fernando de Diego. Tial ke nia eksterordinara tradukisto ne povis alveni, legis lian kontributon Miguel Fernández.

Tagmeze, la kongresanaro trankvile tagmanĝis en la terenoj de la sporta loka rondo "Polideportivo", ĉe multnombraj tabloj starigitaj sub la ombro de arbareto. La menuo: paelo, *sangría* (tipa trinkaĵo el vino kaj fruktosukoj) kaj bonegaj fruktoj, kiuj ŝprucis kvazaŭ mirakle sur la manĝotablojn de la manoj de niaj gastigantoj, la ĉestanaĵ kamparanoj.

Kaj la radio kaj la televido interesiĝis pri la renkontiĝo kaj surloke intervjuis s-ron A. Marco Botella, gajninto de la Literatura Konkurso "Francisco Mániz", organizita de la loka Kultura Ateneo "La Alianza".


Je la kvina posttagmeze, laŭ la programo, la gekongresanoj kunvenis denove en la bela loka teatro. Unue okazis la prezentado de "De Valencio al Valencio" fare de la "Ibera grupo de esperantaj kulturagantoj" (Mi-

guel Fernández, Abel Montagut, Jorge Camacho, Antonio Valen kaj Liven Dek, ne povis ĉeesti Gonçalo Neves).

Poste la publiko daŭre trovis plezuron en la Internacia Arta Festivalo, kiun partoprenis diversaj folkloraj grupoj de kanto kaj danco el pluraj orient-eŭropaj landoj. En unu el la paŭzoj, La prezidanto de la Ateneo anoncis la premiojn de la Literatura Konkurso "Francisco Máñez":

1a— Verko de Antonio Marco Boteilla (Zaragoza): «Kronikoj pri Cheste esperantista» 100.000 pesetojn.

2a— Verko de Kurisu Kei (Japanio): «Rakonto iom longa pri leteroj», 75.000



Grandaj korusoj... belaj voĉoj

pesetojn.

3a— Verko de Sabira Stalberg (Bulgario): «La Maro». 75.000 pesetojn.

Ĉeestis nur s-ro A. Marco, kiu, riceinte la premion, dediĉis ĝin al la memoro de la pioniro Francisco Máñez, kun kiu li gvidis e-kursojn en Zaragoza. Kronis la disdonadon de premioj la urbestrino de Cheste, esprimante sian simpatian por Esperanto, same kiel siatempe faris antaŭaj urbestroj.

Je la fino de la Arta Festivalo Eduardo Vargas (Solo) re-



La instruisto, lernantinoj kaj Maritza

galis la ĉeestantojn per bukado el siaj kantoj.

Ni publike dankas al la organizantoj kaj esperantistoj de Cheste pro tiu travivita tago.

En la dimanĉo, lasta tago de la kongreso oni povis ĝui la prelegon de s-ro Miguel Angel Sancho, kiu helpe de diapozitivaj faris tre bonan klarigan prezenton pri la "Metodologio de plurmedia informadiko".

Post la Ĝenerala Kunveno de HEF, pri kiu vi legos sur alia paĝo de Boletín, okazis la fermo de la Kongreso.

* La fotojn faris José Añó Belda



Paelo por 600!

Ordinara Ĝenerala Kunsido

11

Ĝi okazis en la fakultato pri filologio de la Universitato de Valencia, la 13an de julio de 1997 je la 11a horo. Ĉeestis 33 membroj kaj jenaj estraranoj: José María Galofré, vicprezidanto; José María Bernabéu, kasisto; Manuel Parra, sekretario; Marcos Cruz, vicsekretario; Augusto Casquero, direktoro; Juan Antonio Cabezas, Antonio Marco, Luis Hernández kaj Miguel G. Adúriz, voĉdonantoj.

Oni legis kaj aprobis la protokolon de la antaŭa Ĝenerala Kunsido, la jar-raporton de la estraro kaj la kontojn de la Libroservo kaj de HEF, kun nepra ŝanĝo rilate al la versio aperinta en Boletín. La ŝanĝo rilatas al tio, ke la koston de ŝranko por la biblioteko (175.000 ESP) oni devas rigardi ne kiel "Compra de Mercaderías", sed kiel "Mobiliario".

Ankaŭ oni aprobis (kun 5 sindetenoj) la kotizojn por 1998. Jen ili: ordinara membro 4.000; Patrona membro 8.000; Kolektiva membro 8.000; emerita membro (malaperonta kategorio) 3.200; aparta kotizo por la Fervojista Asocio 20.000; dumviva membro 242.000. Kompreneble ĉiuj membroj posedantaj junulkarton daŭre ricevos 10 elcentan rabaton.

Krome oni decidis ke neniu grupo rajtas fariĝi dumviva membro, kaj ke la kotizo por novaj dumvivaj membroj konsistigu kapitalon en aparta konto.

Poste oni elektis novan HEF-estraron (vidu la 3an paĝon). La sekretario prezentis la kandidatojn: grupo el ok homoj plus triopa konsila komitato. S-ro de

las Heras petis ke la kandidatoj informu pri sia programo, kaj, responde, Miguel G. Adúriz legis ampleksan dokumenton pri la ĝenerala stato de HEF kaj ĝia esperebla estonto (vidu "Pri ni" sur la 4a paĝo).

Ĉi-jare oni liveris la honoran premion "Klara Silberník" al s-ino Ángeles Fernández, edzino de la elstara esperantisto kaj patrona membro de la federacio Jesús Raposo Montero, el Valencio, pro ŝia sindediĉa kaj valora apogo al ŝia edzo en lia fervora strebado por esperanto.

Jam en la punkto "demandoj, petoj, proponoj", spontanaj aplaŭdoj varme sonis kiam s-ro José María Bernabéu memorigis la figuron de la ĵus forpasinta samideano kaj HEF-membro Francisco Zaragoza.

S-ro Alesandro Kasanova informis pri projekto redakti kaj eldoni grandan antologion el etaj tekstoj el ĉiuj mondaj lingvoj.

Laŭ propono de s-ro de las Heras la kunsidantoj longe aplaŭdis la okjaran dejoradon de nia eksprezidanto Antonio Alonso.



Fine la kunsidantoj unuanime aprobis jenan deklaron:

«La partoprenantoj en la Hispana Esperanto-Kongreso okazanta en Valencio, kun hororo, abomeno kaj kolero sciigas pri la murdo de unu plia homo fare de ETA-teroristoj (ĉi-kaze, de sinjoro Miguel Ángel Blanco).

Protestas kontraŭ tia terura atencado

kontraŭ la tria artikolo de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, nome: "ĈIU HAVAS LA RAJTON JE VIVO, LIBERECO KAJ PERSONA SEKURECO."

Postulas de ETA kaj de la ceteraj terorismoj krimantaj en diversaj landoj, ke ili tuj kaj definitive metu finon al ĉia krima agado.»



La apuda foto aperis en la ĵurnalo "El País". En ĝi aperas grupo el la kongresa delegitaro, kiu kun afiŝoj en la 22 lingvoj de la kongreso prezentis la 3an artikolon de la Homaj Rajtoj, antaŭ la urbodomo de Valencio, okaze de la kidnapo, kaj posta murdo de Miguel Angel Blanco fare de abomeninda grupo de teroristoj.

La kongresanoj kun... la Homaj Rajtoj

De Prezidanto al Prezidanto


Kara S-ro Sancho,

Mi elkore gratulas al vi, la nova prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio. Hispanio estas unu el la tre grandaj kaj aktivaj en la tuta monda Esperantujo.

Mi konfidas ke sub via prezidanteco, la Esperanto movado en Hispanio pli vige antaŭeniĝos, harmonie kune kun diversaj esperanto-komunumoj en via lando.

LEE Chong-Yeong, Prezidanto
Universala Esperanto-Asocio

Kio pri ILEI?



Johano de Valencio

Mi bedaŭras la nefunkciadon de la hispana sekcio de ILEI (Internacia Ligo de Esperantaj Instruistoj). Eble la hispanoj estas ege sendependaj... nu ja... ibere—libere.

La esperanta instruado estas la ĉefa celo de ILEI, sed ni vidu ke en Hispanio ne mankas E-instruistoj: Pre-universitato en Santiago sub la gvido de Antonio Alonso, Universitato de Valencia sub la gvido de s-roj Raposo kaj Augusto Casquero; aŭtoroj de lernolibroj kiel Miguel Gutiérrez kaj Félix Navarro el la valencia grupo, ekzistas kurso per komputilo de Galofré, belaj didaktikaj lumbildoj de Muñoz Garre el Alquerias, la gramatiko de Soler en la Fondaĵo Soler, kaj la lernolibro por infanoj AEIOU de José Añó, verko konata en la tuta mondo tra UEA, kaj cetero multaj e-grupoj instruas laŭ sia bonvolo. Tamen, kiu serĉis instruiston por la Ĉe-metoda kurseto dum la Hispana Kongreso? Nu, nek ILEI, nek HEF, sed la organizanto.

Mi kontaktis kun E-o pere de la koresponda kurso de s-ro Zaragoza, iama sekciestro de ILEI en Hispanio, danke al ĝi miaj unuaj paŝoj faris el mi memlernanton. Pardonu do se mi motriĝas tro ilei-ema.

En la nunaj cirkonstancoj ŝajnas necese unuigi programojn, elabori di-

versnivelaĵajn ekzamenojn laŭ la postuloj de ILEI, elabori rapidajn kursojn, interŝanĝi modelajn lecionojn de e-instruistoj, stimuli la verkadon de lernolibroj bazitaj sur freŝdataj pedagogiaj verkoj, organizi seminariojn, verki bazan lernolibron pri literaturo, resumon de la hispana kaj universala e-historio... kaj pli streĉaj kontaktoj kun la Ministerio pri Edukado.

La instruado estas tasko de ILEI utiligante ne la Hispanan E-Federacion mem, sed ties strukturon.

Ni ĉiuj pensas ke la etnaj lingvoj plu vivos per si mem ĉe la familioj, sed tio apenaŭ funkcias en la kazo de Esperanto. La nombro de Esperanto-parolantoj kreskos nur per efika instruado.

Kiu do prenos sur sin la respondeco funkciigi la hispanan ILEI-sekcion? Ĉu Antonio Alonso, Rafaela Urueña, Augusto Casquero, Ana Manero, Luz Vázquez... Ĉu eble iu HEF-estrarano? Ĉu Boletín disponigos al ILEI unu paĝon? Mi esperas vidi la eventualajn reagojn al ĉi artikolo sur "tiu" paĝo de Boletín.

Noto de la redakoro

Boletín estas plene aperta al ĉiu pozitiva kontribuo en rilato al instruado. Fakte, kaj aparte de la propono supre farita, ni planas eldoni sur la paĝoj de la bulteno pri-instruan serion. Kompreneble, la Estraro plene apogas la funkciadon de ILEI sub la HEF-tegmento, kaj pretas disponigi la necesan spacon en la bulteno de la asocio por malfermi diskut-forumon pri la temo.



Iom pri la UK

Komitat-kunsido

La komitato de UEA kunsidis lundon, la 21an de julio.

Dum la trakto de la estrara raporto oni ĉefe diskutis pri landa agado kaj la rilatoj kun eksteraj instancoj. Raportiĝis, ke la rilatoj kun UNESKO estas nun pli fortaj ol antaŭe, pro nova ordigo de la kunlaboro kun neregistaraj organizaĵoj kaj pro pli aktiva agado flanke de UEA. Do la landaj asocioj estas invitataj starigi kunlaboron kun la UNESKO-komisiono de la konkerna lando. La jarraporto de la estraro estis akceptita senŝanĝe.

La komitato decidis labori laŭ la gvidlinioj prilaboritaj por Kampanjo 2000. Oni ankaŭ invitas la landajn asociojn labori laŭ tiuj prioritatoj. Per siaj propraj laborplanoj la landaj asocioj devas prioritati la por ili plej gravajn erojn. UEA gvidos la laboron per nova komisiono elektita de la komitato. Ĝi konsistas el prezidanto Lee, s-ro Corsetti kaj s-ro Buller.

Tago de la lernejo


Enkonduke Atilio Orellana Rojas laŭtleĝis artikolon verkitan de profesoro Duncan Charters, prezidanto de ILEI pri multkultureco kaj lingvolernado. Sekvis raporto de s-ino Jennifer R. Bishop pri la

nun disvolviĝanta Esperanto-projekto EKPAROLI, kies lulilo estas en Melbourne. La ĉeestantoj mem havis okazon vidi kaj ĝui la rezulton de la tiea laboro: infana grupo de la elementa lernejo Carrum kantis kaj prezentis scenojn el la Mazi-filmo, sur kiu baziĝas ilia lernado de la internacia lingvo. Pri la nuna stato de Mazi-materialo kaj ties dissendado en la pola televido, raportis Roman Dobrzyński el Varsovio.

La aŭstralian eduksistemon kaj ties lingvopolitikon prezentis Alan Bishop, profesoro de Universitato Monash en Melbourne.

Fine, la ĉeestantoj havis eblon ekkoni informojn pri alia instrufilmo, "Pasporto al la tuta mondo", kiu pretiĝas en San-Francisko. Lusi Harmon parolis pri la konceptoj de la aŭtoroj, la enhavo de la materialo kaj ĝisnunaj preparlaboroj, kaj vidigis la malnetan version de la kvar, jam filmitaj unuoj de tiu grandioza entrepreno. Ni deziras al ili multan sukceson kaj eĉ pli multe da mono por realigi la instrufilmon.

Pliajn informojn, kontaktadresojn kaj riĉan bibliografian liston pri la nuntempaj projekto celantaj pruvi la propedeŭtikan valoron de Esperanto, troveblas en la lasta numero de Internacia Pedagogia Revuo (2/1997).



Iom pri la 53a IJK

15

La temo de la 53a Internacia Junulara kongreso estis "La Homo: ĉu super aŭ parto de la naturo?"

Patronis la kongreson la Prezidento de Italio Oscar Luigi Scalfaro, kaj, interaliaj, oni ricevis apog-leteron de Luigi Manconi, estro de la itala Verduĵoj.

Solene salutis la episkopo de Assisi mons-ro Sergio Goritti.

Prelegoj: "Eŭropo inter mono kaj popoloj" de Umberto Broccatelli. "La rilatoj inter homo kaj naturo el kristana vidpunkto" de Pastro Gustavo Zanolli. "La pensradikoj de la ekologia krizo" de Dai-thi O' Heallaithe. "Modeloj de eltenebla evoluo" de H. von Blottnitz.

La Akademio

Reprezentis la Akademion en publika kunveno S-ro Yamasaki, S-ro Pettyn, Prof. Wells, Prof. Kiselman, Prof. Wandel.


Yamasaki resumis la laboron de la Akademio. Kiselman menciis sian laboron en la kampoj de matematiko kaj gramatiko. Pettyn parolis pri la problemoj de redakcio kaj rapida lingva kontrolo kaj notis la mankon de eraro-bulteno. John Wells parolis pri la neceso de singardemo pri lingvo-uzo. Li citis kelkajn ekzemplojn, tiujn de la uzo de la malĝusta "plastiko" anstataŭ la ĝusta "plasto" kaj de la malĝusta "tipika" anstataŭ "tipa". Wandel notis la bezonon por iu fajro-brigado, reagi ĝustatempe.

Oni notis, ke baldaŭ aperos hejma vortaro por Esperantaj familioj. Menciita estas la bezono de geografia terminara laboro. Oni menciis ankaŭ la novan komputilan leksikonon. John Wells diris, ke la Akademio ne havis reagon al kompilita radikaro.

Kotizoj 1998

Ordinara membro.....	4.000
Patrona membro.....	8.000
Kolektiva membro.....	8.000
Emerita membro	
(malaperonta kategorio)...	3.200
Aparta kotizo	
por la Fervojista Asocio...	20.000
Dumviva membro.....	242.000

církaŭ



la mondo

“Interredaktore” iĝis 1-jara

László Szilvási, red. de Eventoj

Esti informita...

Antaŭ 1 jaro, en aŭgusto 1996 la redaktoroj de Eventoj lanĉis novan servon “Interredaktore”, kiu iĝis la kunlabora forumo de redaktoroj de E-gazetoj pere de interreto.

Ĉ. 90 redaktoroj (plus UEA/TEJO-estraranoj) ricevas preskaŭ ĉiutage diversajn informojn, artikolojn aŭ por aperi ilin, aŭ por simple “esti informita”. “Interredaktore” koncentriĝas al movadaj, organizaj informoj, sed ne traktas literaturarojn. La dissendandan materialon oni sendas al centra adreso de Eventoj, kiu zorgas pri la aktualigo de reta datumbazo, kaj distribuas la artikolojn (simile al iu “Esperanta novaĵagentejo”).

En la daŭro de la jaro estis dissendita 388 mesaĝoj, kio signifas ke averaĝe en ĉiu labortago redaktoroj ricevis 1,5 mesaĝon. (Tamen en la realo la mesaĝoj disiras ne ĉiutage, sed laŭ la ritmo de la alvenantaj materialoj).

“Interredaktore” tiel iĝis la plej ofta (preskaŭ ĉiutage) informilo en la mova-

do. Ĝi multe helpas al la ricevantoj ne nur redakti sian gazeton, sed havi superrigardon pri la aktualaj eventoj de la E-movado, kaj simple “esti informita”.

Ankaŭ vi povas utiligi la servon: se vi volas komuniki ion al E-redaktoroj, se vi havas interesan (movad-rilatan) informon, artikolon, se vi volas iun informon distribui — sendu vian retmesaĝon al “hungary.net” kun la mencio, ke la mesaĝo estas por “Interredaktore”.

1a Kongreso en Kroatio

S. Ŝtimec

Ducent partoprenintoj el trideko da urboj el Kroatio ricevis bonan stimulon verve daurigi la laboron pri Esperanto. Post 18 publikigitaj artikoloj kaj unu TV-elsendo la vaste legata gazeto Vecernji list (eldonkvanto 400.000 ekz.) dediĉis la 24-an de junio apartan atenton al la kongresa poŝtmarko. La poŝtmarko kun la portreto de Zamenhof aperis en 350.000 ekz.

KEL atendas novan ondon da gaze-tinformoj kiam venos el la monforĝejo speciala kongresa monero de 25 kunaĵoj.

Finnlando

Danke al la sukcesa 80a UK de Esperanto, la loka klubo de Tampere “Antaŭen” aĉetis por si ejon en la urbo-centro. La ejo situas en la 1a etaĝo kaj funkcias kiel konstanta oficejo kaj klubejo.

Jukka Laaksonen


Kiel statas nia PIV?

Kiam, en 1990 SAT proponis al mi — aŭ en 1991, kiam mi akceptis — prilabori revizion de PIV cele al nova eldono, mi ne imagis la amplekson de la tasko — eble feliĉe, ĉar probable mi ne akceptintus! Ni deziras, diris tiam la Plenum-Komitato: “ordigi la vortaron, enigante la suplementon kaj la ilustraĵojn; enŝovi la novajn vortojn kaj korekti la ekzistantajn erarojn.” Ne tro malfacila laboro, ĉu ne? Tiom pli, ke Waringhien en februaro de 1991 eldiris sian kontenton pri mia akcepto, donis kelkajn konsilojn kaj promesis revizii la modifojn, kiujn mi enkondukos...

Bedaŭrinde, teknika problemo malfruigis la laboron. La skanadon plenumis Claude Roŭ, sed la korektado de la skanita teksto de nia vortaro daŭris longe, kaj en 1994 Claude Roŭ kaj mi avertis la partoprenantojn de la SAT-Kongreso en Straznice, ke, se ni ne trovos rapide sufiĉe multajn kaj laborkapablajn volontulojn por tiu laboro, ni ne povos garantii la progreson de la revizio. Tiu alarmo efikis tiel, ke du jarojn poste, danke al la dek ses gekamaradoj, kiuj suferigis siajn

okulojn super tiu tasko, tiu prepara laboro estis finita kaj ni povis komenci la enkomputiligon de la modifoj.

Intertempe (t.e. jam ekde 1991) estis progresinta la revizia laboro. Unue per utiligo de la notoj, kiujn Waringhien faris sur sia ekzemplo de PIV por estontaj modifoj (tiun ekzempleron mi povis konsulti danke al la kunlaboremo de “La Kvinpetalo” en Bouresse, kiu posedas la bibliotekon de Waringhien) kaj de diversaj rimarkoj, kiuj troviĝis en la arkivo de



k-do Levreaud, kunlaborinto de Waringhien por la “Suplemento”. Due, danke al la kontribuoj, kiuj atingis nin iom post iom (kelkaj alvenas ankoraŭ nun), kaj kiujn sendis tre multaj kunlaborantoj el ĉiuj regionoj de Esperantujo.

La unua alvoko, kiun faris jam en 1991 la SAT-Oficejo, ricevis tre limigitan ehon, kvankam ĝi estis sendita al ĉiuj membroj de la Akademio de Esperanto, al la dekanoj de la Akademio Internacia de Sciencoj (San-Marino) kaj al la gvidantoj de la fakaj asocioj, registritaj en la Jarlibro de UEA. Dua alvoko estis farita kelkajn jarojn poste al kelkaj dekoj da aparte kompetentaj esperantistoj, kiuj ne

estis trafitaĵoj de la unua alvoko. Intertempe, per personaj kontaktoj kaj pro la diskonigiteco de la entrepreno (kiu do parolis iam pri "laboro sekreta"?), ni sukcesis arigi teamon el ĉ. sesdek fakuloj (inter kiuj troviĝas dek unu membroj de la Akademio de Esperanto), regule kunlaborantaj kaj zorgantaj pri la diversaj fakaj partoj de nia leksiko. Proksimume sama nombro da homoj sendis al ni diversajn rimarkojn - kelkafoje multnombrajn kaj tre gravajn - pri la ĝisnuna enhavo de la vortaraj artikoloj. Danke al ili la laboro povis progresi, ĉar du rimarkoj pri eraretoj, rimarkitaj de simpla lingvo-uzanto pli valoras, ol dek gazetaj artikoloj pri la dezirindaj profilo kaj strukturo de La Ideala Vortaro.

Al sia laboro teknika por skanado kaj solvado de multaj komputikaj problemoj Claude Roŭ aldonis la kunordigadon kaj kundiskutadon de la kontribuoj, kiuj koncernas la sciencojn de la vivo kaj de la materio t.e. la plej pezan kaj malfacilan parton de la faka laboro. Danke al la laboro de niaj kunlaborantoj gravaj fakoj, kiel anatomio, beletro, botaniko, ekologio, ekonomiko, geologio, kemio, komputiko, kuirarto, matematiko kaj statistiko, medicino kaj kirurgio, muziko, paleontologio, psikologio kaj psikiatrio, trafiko, zoologio k.a. estas jam pritrakitaj aŭ estos baldaŭ fintrakitaj. La laboro super kelkaj aliaj fakoj (biologio, lingvoscienco, religioj, teknikoj...) ankoraŭ ne estas finita, sed troviĝas sur bona vojo. Por pluraj el tiuj fakoj necesas plena reorganizo. La terminoj koncernantaj ekologion kaj komputikon evidente plimultiĝis. La vortoj, inkluzive de la propraj, rilatantaj al politika situacio de la mondo,

ricevos kompreneble ĝisdatajn difinojn kaj informojn.

Ni ankoraŭ ne povas difini precizan daton por la livero de la "manuskripto", sed ni jam ekvidas la finon de nia laborado.

Michel Duc Goninaz (el Sennaciulo)

Pola AIS-filio

En Varsovio (PL) oficiale estis registrita "AIS Pollando", pola filio de Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino.

Tiu asocio kunigas la pollandajn aktivadojn de AIS kaj estas malferma por kunlaboremaj sciencistoj kaj aliaj AIS-anoj en tuta Pollando.

Ankaŭ "esperanto.org" registrita!

Ĝis nun jam ekzistis la retregiono "esperanto.net", pluraj landaj E-regionoj kaj nun la organizo "InterNIC Registration Services" registris ankaŭ "esperanto.org"

La proceduron por rezervi la regionnomon "esperanto.org" por la organizaĵo "Esperanto" finfaris David Harris (42326 Gatewood Str. Fremont, CA 94538-4126, USA, retadreso: zonker@semo.tio.net), kiu ankaŭ prizorgas ĝin, pri la teknikaj aferoj zorgas Jeffrey Komori (jeffk@ricochet.net).

Oni planas funkciigi la regionnomon kiel vera centro de Esperantaj retaferoj, ekz. per akcepto aŭ speguligo de retpaĝoj, startigo de diversaj korespondaj listoj ktp. Detaloj iom post iom aperas ĉe: <http://www.esperanto.org/>

Baldau vi
konos min
sur la paĝoj
de
Boletín!



Vojoj al la publiko

Laŭ kolektitaj datumoj troviĝas Esperanto-bibliotekoj kaj e-muzeoj en la jenaj landoj: Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥio, Suomio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Luksemburgio, Nederio, Norvegio, Polio, Svedio, Svisio, Usono.

Aldonendas, ke parte temas pri veraj Esperantaj- kaj parte pri aliaj institucioj kiuj eldonas/-is Esperanto-version de katalogoj aŭ varbiloj.

Apartan atenton meritas muzeoj, kiuj uzas la internacian lingvon por prezenti siajn ekspoziciitaĵojn, ekz. la muzeo *Plantin-Moretus* en Antwerpen, kie oni disponigas al la vizitantoj E-lingvan muzean gvid-kasedon.

C. Borremans

Ada

Pludaŭras la omaĝoj al Ada Sikorska-Fighiera

Multloke tra la mondo plue okazas ceremonioj kaj omaĝoj dediĉitaj al la memoro de Ada Sikorska-Fighiera, kiu redaktis la gazeton "Heroldo de Esperanto" dum ĉ. 36 jaroj: ŝi mortis en Torino (Italio) antaŭ preskaŭ unu jaro.


La Internacia E-Kongreso okazinta

en Valencio (Hispanio) kaj la UK en Adelaido (Aŭstralio) nomis salonon je ŝia nomo: en la UK polaj geaktoroj ludis teatraĵon bazitan sur ŝia taglibro. Monda Turismo aperigis paĝon en Internet pri Ada; Pola Radio decidis memorigi ŝin dum plena dissendo la 1an de novembro.

Interreto

Esplorroboto komprenas Esperanton

EuroSeek, la eŭropa alternativo al la usonaj esplorrobotoj Altavista, Lycos kaj Yahoo! celas fariĝi unu el la gvidaj internaciaj robotoj por la esplorado de la interreto. Tion ili provas atingi donante al la uzantoj la eblecon mem elekti la lingvon uzata por la esploro, kaj ne esti devigata uzi la anglan. Oni povas jam



nun elekti inter 40 malsamaj lingvoj, de la bretona ĝis la turka. Nun ankaŭ Esperanto estas inter ili.

Oni ne bezonas loĝi en Eŭropo por uzi EuroSeek. Ĝi estas atingebla de kie ajn ĉe la adreso: <http://euroseek.net/>

Franko Luin (franko@esperanto.se)

IKEF

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) konsistas el 240 komercistoj kaj ekonomikistoj uzantaj la

Internacian Lingvon.

La organo de la asocio estas la 12-paĝa bulteno "La Merkato", kiu regule aperas 4-foje jare en formato A-5.

IKEF alireblas ankaŭ pere de la interreto. Jen la adreso de ĝia hejmpaĝo, prizorgata de Bent Holm: <http://www2.dk-online.dk/users/TeamHolm/ikef.htm>

2a video-festivalo

Se vi emas filmi amatore aŭ profesie, jen vi havas la eblecon prezenti viajn E-videofilmojn al la publiko.

La 2a Esperanto-Videofestivalo okazos kadre de la jarĉefkonferenco (28-30.11.97) de Ĉeĥa E-Asocio la 30an de novembro en Prago. Akcepteblas ĉiuj vaste konataj normoj. La prezentado okazos sur granda ekrano. Kompreneble ankaŭ "simplaj" spektantoj rajtos ĉeesti la projekciadon — ili estas eĉ aparte bonvenaj!

Kontaktu: Kava Pech; Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice, Ĉeĥio (chrdle@kava-pech.cz).



Korea Kongreso

La 29a Korea Kongreso de Esperanto okazos de la 25a ĝis la 26a de oktobro 1997, en la urbo Gjonĝu. Por ricevi pli detalajn informojn kontaktu: Korea E-Asocio; C.P.O. 4258, Seulo 100-642; Koreio (keast@soback.kornet.nm.kr).

Irano

La manifesto de E-movado estas tradukita en la persan. Sabz Andishan Instituto (SAI) ĝin eldonis en 5000 ekzempleroj kaj jam komencis ĝian distribuon okaze de la 10a internacia libroekspozicio de Tehran.

La reago de la publiko al la manifesto estis tute neatendita. La instituton bombardis telefonvokoj kaj faksoj de kulturcentroj kaj universitatoj, oni esprimis sian atenton kaj intereson pri la enhavo de la manifesto. Laŭ multaj la enhavo kaj la mesaĝo de la manifesto estas ekvilibraj kaj en ĝi oni ne trovas troigon sed faktojn. De la universitato de Tehran oni petis proprajn informilojn por la studentaro.

M. Reza Torabi (irejo@neda.net)

Adolfo Bioy Casares

La 15an de majo la renoma argentina verkisto Adolfo Bioy Casares prelegis en Roterdamo lige kun la fotoekspozicio "Refuto de la tempo" de argentina artisto.

En plena salono de la Urba Biblioteko Teatro intervjuis lin la direktoro de la Utreĥta filio de Instituto Cervantes, la

menciita artistoj kaj la galeri-estro gastiganta la ekspozicion. La tuto okazis en la hispana lingvo kun samtempa interpretaĵo en la anglan kaj nederlandan.

CO-stabano Franĉjo Veuthey demandis lin kiel verkiston de fantastaj rakontoj, ofte ligitaj al inventoj kaj inventistoj, pri lia opinio rilate la "inventadojn" Esperanto. La kreinto de la romano "La inventado de Morel" respondis: "Ĉiam ŝajnis al mi bona la ideo pri internacia lingvo. Mi neniam inkludigis a menciis ĝin simple pro tio ke mi ne konas ĝin, mi neniam studis ĝin". La intima kunlaborinto de Jorge Luis Borges firme asertis fine: "Esperanto havas mian plenan aprobon".

Liaj vortoj, pli-malpli kiel ili estis diritaj en la hispana:

"Siempre me pareció que la idea de una lengua universal es muy buena. Nunca la incluí o mencioné (en mi obra) porque no conozco el idioma (esperanto), nunca realicé un estudio de él. Pero sí, el esperanto cuenta con mi total simpatía."

Korea E-Asocio

KEA havas 6 filiojn en la lando, kaj 2 el ili jam havas propran oficejon. La centra oficejo de KEA translokiĝis en la centron de Seulo. La nova 100 m²-a ejo kostis 200 mil guldenojn. Fakte, KEA havas la ambicion eĉ konstrui propran domon. La nova adreso estas: Nagwon-dong 50-9; Chongnogu, Seoul, 110-320 Koreio. (keast@soback.kornet.nm.kr) Tel: +82-2-7411290.

Choe Taesok

Tago de la Hispana E-Muzeo

Kiel anoncote, la 15an de junio 1997 oni festis en Sant Pau d' Ordal la tagon de la "Hispana Esperanto-Muzeo", kun la celo danki kaj diskonigi la laboron faritan de gesamideanoj Lluís Hernández Izal kaj lia edzino Teresa Massana.

Unue s-ano Hernández Izal detale informis pri la deveno de la muzeo kaj la klopodoj faritaj ĝis nun. Ofte li ripetis, ke la muzeo estas je la dispoŝo de ĉiu esperantisto deziranta akiri superajn konojn pri la historio de la E-movado.

S-ano Salvador Gumá, la plej veterana hispana esperantisto (li aĝas 96), prezentis prelegon kun tre originala titolo: "Nombroj. Moneroj. Organoj. Misteroj". Ĉi tiuj kvar vortoj, saĝe miksitaj de s-ano Gumá, estis vera ekspono en la tempo kaj la spaco pri multaj aferoj ŝajne tre simplaj. Kiel ekzemplon, li elektis la ŝtatan ŝuldon, kiu, se pagata per unupestaj moneroj vice metitaj, atingus astronomiajn ciferojn de kilometroj. Kompare kun tiuj senfinaj nombroj, li prezentis la organojn de nia korpo kaj la misterojn, kiuj funkciiĝas ilin. Li parolis pri la milionoj da litroj da sango, kiujn pumpis lia koro dum 96 jaroj da vivo, kaj la fakto ke li tradormis 34 el tiuj jaroj! Al tio oni aldonu aliajn komparojn, ekzemple rilate la senfinan kosmon, kaj oni ricevas plej originalan prelegon.

Sub la titolo "La Muzeoj, arkivoj de la historio", la subskribinto de tiu ĉi artikolo parolis pri la rolo de la muzeoj ekde la ekzisto de la homo. De la primitivaj rudimentaj formoj por kolektado de objektoj ĝis la modernaj muzeoj. Specialan

2 reliefon mi donis al la Hispana E-Muzeo, al ĝia valorega enhavo kaj al nia devo riĉigi kiel eble plej multe tiun trezorejon.

Je la fino de la aranĝo, en la nomo de la "Babiladoj", oni transdonis al geedzoj Hernández-Massana memorigan tabulon kun gravurita teksto aludanta la eventon. En la nomo de Hispana E-Federacio salutis s-ano Augusto Casquero.

En la ĉampano-kelo, frimao Massana, ni estis abunde regalataj per ŝaŭmino kaj bongustaj apetitigaĵojn. Poste, fine de frateca kunmanĝado en resoracio, oni varmege tostis je gesamideanoj Elfriede-Sudec, kiuj, post dek kvar jaroj inter ni, decidis reiri en Kroation.

Luis Serrano Pérez

Japanio

Lastjare ĉiuj 29 stacioj de la Kamaishi-Linio de Japanaj Relvojoj (JR) ekhavis Esperantan karesnomon, ĉar la loko, kie troviĝas la linio estas la hejmloko de Kenzi.


Iu oficisto neesperantista de Orienta JR ekhavis la ideon, ke la stacioj havu Esperantan nomon. Esperanto ŝajnis al li freŝa, kaj li nomis la staciojn helpate de SATO Ŝoiĉi: Ĉielarko, Folkloro, Verda Vento ktp. Tiel al vojaĝantoj ĝuas etoson kvazaŭ en fremda lando.

H. D. laŭ Novaĵoj Tamtamas 118

TV-filmo pri Zamenhof

Ĝis nun ni sciis, ke Zamenhof mem ne estis filmita. Sed antaŭnelonge en la televido aperis franca dokumentfilmo-serio pri la 20a jarcento. En ĝi oni povis

vidi, kiam temis pri la 1910aj jaroj, kelksekundan pecon okaze de iu UK en Francio.



Bedaŭrinde ni ne povas doni pli da konkretaĵoj. Ĉu eble ankaŭ ekzistas filmoj pri Zamenhof ĉe la dokumenta materialo de la hispana NODO?

Por eventuala informado kontaktu HEF aŭ Sandor Hideg.

OSIEK-Premio 1997

OSIEK informas ke okaze de la Internacia Esperanto-Konferenco 1997a en Rafina, Grekio, la membroj de sia societo, kiuj ĉeestis la konferencon, decidis aljuĝi la OSIEK-Premio 97, inter la kvin aŭtoroj plej ofte proponitaj de membroj dum la jaro, al s-ro Fernando de Diego, pro lia traduko de «Cent Jaroj da Soleco» de Gabriel García Márquez, eldonita de Chapeco, Brazilo, 1992, 372p., kaj aĉetebla ĉe la libroservo de HEF.

Pelmele

Asekuroj

Vojaĝ-asekurojn por esterlandanoj en Svislando, kune kun alispecaj asekuroj, ofertas Marko Zuan, Bergstr. 132, CH-8032 Zuriko, Tel. +41-1-382 3686.

E-Aranĝoj

Esperanto kaj militoj!
Bonvolu reĥi personoj, kiuj interesiĝas pri la temo "Esperanto kaj militoj" aŭ havas materialojn aŭ historiajn atestojn pri agadoj de esperantistoj dum ĉiuj militoj en la tuta mondo en la 20a jarcento. Anticipan dankon. Jurij Ševĉuk, ul. Gagarina 57-19; RU-169700; Komi, Peĉora; Rusio.

Infanoj

Se vi konas kantojn aŭ rimajojn por malgrandaj infanoj (en E-o), bonvolu sendi ilin al la Reto-Klubo de Esperanto-parolantaj infanoj (retoklubo@geocities.com).

Kontaktoj

Amikeca Reto estas "reto" de gastigantoj farita de SAT, tamen aliĝebla de

ĉiu esperantisto. Ankaŭ vi povas partopreni en la Amikeca Reto!

— Aĉetu la adresaron, kie aperas adresoj, aktivajoj, vizitindaj lokoj, utilaj informoj kaj interŝanĝoj de la akceptantoj de la Amikeca Reto. Ĉiu adresaro kostas nur du mil pesetojn.

— Fariĝu akceptanto de la Amikeca Reto. Pli da informoj ĉe:

Virginia Aguilar; C/ V. España, 11-13. 3-B; ES-50006 Zaragoza.

Lernejoj

Ĉu vi jam gvidis projekton pri Esperanto en la lernejo dum "projekta semajno"? Se jes, bv. informi min pri viaj spertoj kaj rekomendoj. Eble vi eĉ havas elprovitajn materialojn? Bv. skribi al: s-ro Hermann Mayer, Schlappmuhler Pfad 15, DE-61250 Usingen, Germanio. Dankon!

Libroj (1)

Ni preparas terminaron de ĉina medicino en esperanta, angla kaj franca lingvoj, kaj venontjare aperonta. La antaŭvidita vendoprezo estas

20 dolaroj. Antaŭmendoj tre faciligus kaj akcelus la eldonon. Kontakto do: Prof-ino GU Jian-hua; 20 Yang Ming Lu; Tianggxi Zhongyi Xue-yuon; CN-330 006 Nanchang; Ĉinio.

Libroj (2)

365 tagoj el la Biblio estas libro kun etaj legaĵoj el la Biblio por ĉiu tago de la jaro. Petu la libron senpage ĉe: Jerald Veit; Kristana Inform-Centro; 3578 S. Taylor Ave., Milwaukee, WI 53207-3439, Usono; Rete: Jveit@doc.gov

Libroj [3]

Dagestana E-Centro bezonas (propagandcele) unu-du ekzemplerojn de La Nobla Korano en E-o. Kiu povas donaci aŭ interŝanĝi kontraŭ iuj aliaj libroj? Kontakto: Abdurahman Junusov, ab. ja. 74, RU-367000 Mahaĉkala, Dagestan, Rusio. Tel. +7-8722-630643. Rete: junusov@espero.siol.ru

Ludo

Atentu: aperis tute nova (t.e. ankoraŭ ne internacie aĉetebla) komputila ludo en Esperanto por IBM-kongruaj komputiloj Ĝi estas klasikstila kaj grafike kaj sone tre altkvalita. Akiru senpagan plene ludeblan demoversion ĉe: <http://www2.dk-on->

Radio

La frekvenco de Radio Havano al Eŭropo estas 9550 kHz (31 metra bendo) je 19.30 kaj 22.00 UTC. Adreso: Radio Havano, E-Redakcio; Pf. 6240, Havanna, Kubo.

Revuoj [1]

Mi serĉas malnovajn numerojn de *Internacia Pedagogia Revuo*, oficiala organo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (T.A.G.E.), porinstruista organizaĵo kiu aktivis antaŭ ILEI. Mi posedas la 6an nron de la jaro 1937, 16a eldonjaro. Ĉu eble iu posedas tutan kolekton aŭ kelkajn aliajn numerojn kaj pretas donaci ilin? Kontakto: Marija Beloŝeviĉ; Sveti Duh 130 HR-10000 Zagreb; Kroatio; retadreso: mbelosev@public.srce.hr

Saniĝo

Matthias Kamp, medicina kuracisto kaj aŭtoro de la libro *Revolution in der Medizin* (Revolucio en la medicino), kuracista dokumentado de saniĝo per spiritaj fortoj, serĉas esperanto-parolantajn kuracistojn, naturkuracistojn k. a. Li gvidas la medicinsciencan fakgrupon de la Amikaro Bruno Gröning. Ĝi

estas unu el la tutmonde plej grandaj grupoj pri spirita saniĝado, en kiu ĝis nun ankoraŭ ne ekzistas Esperanto-sekcio en la medicina fako.

La fakgrupo kunligas pli ol 1600 homojn profesie ligitaj al kuracado, inter ili ĉirkaŭ 300 medicinajn kuracistojn. Pere de regula, senpage eldonata fakrevuo, kunvenegoj kaj regionaj kunvenoj oni interŝanĝas spertojn, kaj la diversaj fakuloj konatiĝas kun la spirita saniĝo.

Interesiĝantaj kuracistoj, sed ankaŭ personoj el aliaj kuracaj profesioj, turnu sin kun mencio de la profesio kaj komprenataj lingvoj al la respondeculo de la amikaro pri Esperanto: Detlef Meier, Hauffstr. 15, D-63071 Offenbach, Germanio.

Sidejo

La E-Societo de Bratislava havas novan sidejon: Rovnikova 6, etaĝo 5. SK-82102 Bratislava, Slovakio. Tel: +42-7-291604. La kunvenoj okazas vendrede de la 17a horo. Vizitantoj bonvenas.

Vizito

Saluton! Mia nomo estas Danijela POPOVIĈ. Mi aĝas 24 kaj studas la hispanajn lingvon kaj literaturon. Mi parolas Esperanton, la hispanan kaj la anglan lingvojn.

En oktobro ĉi jare mi vizitos Hispanion por ekkoni ties homojn, lingvon kaj kulturon. Ĉu vi povas helpi al mi trovi loĝadon ĉe lokaj esperantistoj? Mi povas prepari kelkajn prelegojn por viaj esperantistoj pri interesaj temoj (E-movado en Serbio, serba lingvo, Serbio ĝenerale, Beogrado...) laŭ via plaĉo. Kontakto min ĉe: Danijela Popoviĉ, (Serbia Esperanto-Ligo); Terazije 42; YU-11000 Beograd

Guardamar

Daŭrigante longjaran tradicion, okazis en Guardamar de Segurá (Alicante), la 7an de septembro, la ĉiujara renkontiĝo, en la bela natura parko "Las dunas de Guardamar", kun amasa ĉeesto de esperantistoj, ĉefe el Valencio kaj Murcio. Kiel kutime la arango estis tre bone organizita, ĉefe danke al la familio Bernabeu kune kun aliaj samideanoj el Alakanto. Etoso, vetero, babilado kaj manĝado estis ege bonaj, kaj ĉiuj adiaŭis sin promesante reveni en la jaro 1998.



Korespondemaj

25

✱ 40-jara korea e-isto, Patrona membro de HEF, deziras vivi en hispanio kaj, eventuale edziĝi, deziras korespondi kun hispanaj e-ist(in)oj. Li parolas iomete la hispanan, kaj volas starigi klinikon por kuraci pere de akupunkturo kaj natura terapio, Ankaŭ lernejon pri tiuj kurac-metodoj. Li jam estis en hispanio kaj eĉ havis kiel pacienton la golfiston Seberiano Ballesteros. S-ro Jin Mun Gong; Kwang-Hwa Mun; P.O.kesto 1480; Seoul 110—614; Korea Respubliko.

✱ 20-jara e-isto serĉas kontaktojn por interŝanĝon de ideoj, poŝtmarkoj, poŝtkartoj, esperantajoj. Li ŝatas vojaĝojn, turismon, naturon, muzikon kaj sporton. Mamadou Tanou Bâ; Rue 5 x 8 chez Ousseynon Dramé; Medina, Dakar; Senegal.

✱ 28-jara komencanto deziras korespondi kun 16—35-jaraj homoj sen

uzado de la angla. Ŝatoj: mallong-ondaj radioelsendoj, komputilo, genealogio, nefikciaj libroj, poŝtmarkoj. S-ro Kevin A. Robb; 139 Mattocks Road; Stephens QLD 4220; Aŭstralio.

✱ Mi estas 39-jara invalida fraŭlo kaj serĉas amikojn kun aĝo inter 25 kaj 29. Emoj: Bildkartoj; fremdlingvaj bultenoj, gazetoj kaj lernolibroj; diskoj; poŝtmarkoj. Vi povas skribi en E-o aŭ en la hispana. Mi ŝatus ricevi vian foton. S-ro Tapani Lappalainen; Hauralandie 98; FIN—37500 Lempiälä; Finnlando.

✱ Mi invitas volontulojn subteni min je mia ideo organizi en Rusio “perkorespondan kurson de Esperanto”, kaj disvastigi sciojn pri Esperanto en la tuta lando. Leteru al: Anatolo Guk; poŝtamt p.k. 43; 347900 Taganrog; Rostovskaja obl; Rusio.

✱ Komencanta sesdekjara israelanino, mem

pentristino, serĉas aliajn artistojn por interŝanĝi opiniojn pri arto. Skribu al: Rachel LECHZIN, B.P. 5025, 7715 ASHDOD, Israelo.

✱ Teheranaj gekomencantoj inter 18 ĝis 50 jaraj deziras korespondi tutmonde. Skribu al la instruisto: M.Reza Torabi; P.O. Kesto 17765-184; Teheran, Irano.

✱ Mi tre bezonas korespond-adresojn por miaj 10-15-jaraj gelernantoj. Respondo certas! Nia komuna adreso: Esperanta klubo “Laro”, a/ja 913, RU-354000 Sochi, Rusio (bespalov@sochi.ru).

✱ Kun hispanaj kaj usonaj esperantistoj pri ĉiuj temoj, f-ino Dina Randriarimanana; Lot. 7-Cite Mandroseza; MG. 101 Antananarivo; Malagasio.

✱ Komencanto en E-o deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Mi estas studento 19-jara pri ekonomio. Mi kolektas bildkartojn, ŝatas muzikon kaj historion, multe legas. Bonvolu skribi al Mikaelo Baranov, Rusio - 17005 Tverj, Konoplannikovo, 4-27.

Lirikaj Perloj de Al Andalus

Kelkaj rimarkoj pri la libro

Bernard Golden

Ĝeneralaj impresoj

Finfine mi tralegis la libron *Lirikaj perloj de Al Andalus* (Zaragoza, 1995), kiun la aŭtoro Antonio Marco Botella afable sendis al mi. Anstataŭ pritaksi la verkon per kutima recenzo, mi preferas fari apartajn rimarkojn nur pri tiuj aspektoj de la enhavo, kiuj altiris mian atenton dum la unua legado.

Unu demando, kiu konstante prezentigis, temas pri la tradukado: ĉu la aŭtoro mem esperantigis ĉiujn poeziaĵojn el la originalaj arabaj versioj, aŭ ĉu ni havas aferon kun tradukado en Esperanton surbaze de jam tradukitaj tekstoj en la hispana, franca aŭ angla lingvoj?

Ŝajnas al mi, ke la libro, per troigoj kaj ripetado de ŝablone idealigitaj bildoj, volas konvinki legantojn, ke Alandaluso estis legenda lando "kie regis Poezio, kaj Amo okupis tronon!" Certe respondecas pri idealigo de la virino kaj la naturo la multaj plejadoj de poetoj, kiuj uzis la saman lingvaĵon en nenombrelaj poemoj. Ja post lego de dek a dudek oni scias pri la enhavo de cent, ĉar la samaj temoj kaj tropoj konstante reaperas. Kompreneble, ne nur la poetoj kulpas pri tiu tro abunda uzo de kliŝoj; ili tiel devis kontentigi siajn mecenatojn, kiuj estis la altrangaj politikaj gvidantoj en la socio.

Legado de la historiaj priskriboj kaj anekdotoj malkovras, ke Alandaluso ne ĉiam kaj ĉie estis lando, kie regis poezio kaj amo. Plurfoje oni povas scii pri kalifoj kaj aliaj regantoj, kiuj per unu mano surpaperigis versaĵojn kaj per la alia svingis glavon, kiam estiĝis "terura interna konfliktaro". La poetoj ja adaptiĝis al tiu vivmaniero, ĉar estas skribite, ke en palacoj de militestroj ili deklamis inter batalo kaj batalo kaj ankaŭ okaze de orgioj kaj diboĉoj.

Detalplena pritraktado

Mi devas konfesi, ke ne estas facile ensorbebla, eĉ dum atenta legado, granda parto de la tre detala literatur-historia pritrakto de eventoj kaj la kontribuadoj al beletra kulturo malmulte konata kaj ĝenerale konsiderata ekzota laŭ la vidpunkto de eŭropanoj. Svarmas sur la paĝoj de la libro tro da nekonataj nomoj en fremda lingvo, la araba. Pli malfaciligas la orientiĝon eĉ de klera leganto malesto de multaj helpiloj, kiuj servus por rilatigi la novan materialon al jam poseditaj scioj.

Unue, diversspecaj mapoj estas bezonataj por montri la geografian situon de la abundo da toponimoj, kaj la politikan kaj kulturen etendiĝon de la regnoj kaj etnaj grupoj. Nemalhaveblaj estas ankaŭ kronologia tabelo kun la nomoj de regantoj, lokoj kaj periodo de regado. Alia

Libroservo de HEF

Nova katalogo

Ĉiu regula kliento de la Libroservo,
ricevas la "Katalogon"

tuj kiam nova eldono pretas.

Tamen,

se vi estas leganto de Boletín
kaj deziras

ricevi senpagan ekzempleron,
sendu leteron al jena adreso:

Libroservo de HEF
Apartado 119
47080 Valladolid

speco de kronologia tabelo devas resumi en paralela maniero la plej gravajn historiajn kaj kulturajn eventojn en Alandaluso kaj samtempajn eventojn aliloke en Eŭropo. Nepre bezonata estas ankaŭ kompleta indekso de arabaj nomoj kun la ekvivalentaj asimilitaj formoj en eŭropaj lingvoj, per kiuj, tiuj homoj estas pli vaste konataj en la monda kultura historio.

Lingvouzo

Okaze de pretigo de nova eldono de la verko, estas necese atenti la sekvajn aspektojn de la lingvouzo. Unue, pro la ofteco de la toponimo *Al-Andalus*, ĝi devas esti esperantigita kiel "Alandaluso". Sekve, la adjektiva formo iĝas "alanda-

lusa", kaj la loĝantoj "alandalusanoj". Dua vortuzo, kiu frapas la atenton estas ignoro de la diferenco inter "kalifejo", "kalifujo" kaj "kalifeco". Kelkfoje "kalifejo" kaj "kalifujo" estas nekonsekvence uzataj eĉ sur la sama paĝo! (Plena klarigo troviĝas en mia artikolo "Kie regas kaj rezidas la kalifo?", *Kajeroj el la Sudo*, n-ro 18, 1993, pĝ. 15-17.) Leganto, kiu volas informiĝi pri ĉiuj aspektoj de la historio kaj la literaturo de Alandaluso, trovas konfuza la mankon de unuforme-co en la ortografio de transskribitaj nomoj. Ekzemploj estas "muoŝaho" (pĝ. 108), moaŝaho" (pĝ. 102 kaj 319), "muaŝaho" (pĝ. 318), "almorabido" (pĝ. 146), "almoravido" (pĝ. 188) kaj "almo-hado" (pĝ. 309), "almoado" (pĝ. 317). Kial mankas la glosa de *seguidilla* (pĝ. 114) en la 2a apendico?

Ne estas facile enkapigi kaj memori la longajn arabajn nomformojn, kiuj kelkfoje plenigas tutan linion kiel "al-Haytam ibn Ahmād ibn Yafar ibn Ab-Galib Ab_-l-Mutawakil" (pĝ. 186). Ili ja ne estas simple nomoj de homoj sed resumo de ilia genealogio!

Mankhavaj bibliografiaj referencoj

En la 3a apendico titolita "Libroj konsultitaj", multaj eroj en la listo ne donas sufiĉe da informoj, por ke konsultanto sciu en ĉiuj kazoj, ĉu temas pri libroforma verko aŭ artikolo aperinta en periodaĵo. Plurfoje mankas adekvataj indikoj pri la nomo de la eldonejo kaj la loko kaj dato de publikigo. Tiu sekcio bezonas drastan revizion, por ke *Lirikaj perloj de Al Andalus* servu kiel vere utila konsultlibro.

Respondo al Bernard Golden pri la libro "Lirikaj Perloj"

Antonio Marco Botella

Unue mi volas publike danki al s-ro Golden lian kunlaboradon en mia tasko kiel ĉefredaktoro de *Boletín kaj Kajeroj el la Sudo* laŭlonge de naŭ jaroj seninterrompe. Kiel estas normale, miaj opinioj ne ĉiam koincidis, sed ni solvis niajn diferencojn per civilizitaj eksplikoj kaj reciproka respektemo, kaj ni daŭre sekvas tiun linion. Dankon, s-ro Golden!

Kaj ni tuj alvenu al la temo pri liaj opinioj rilate al kelkaj aspektoj de la enhavo de mia libro *Lirikaj perloj de Al-Andalus*.

1a respondo: Kolekti la originalojn en la araba lingvo de tiuj 179 poetoj biografiitaj en *Lirikaj perloj*, apartenantaj al preskaŭ ne sufiĉe konata civilizacio de la mezepoko, iam duonperditaj en diverslandaj arkivoj, estas tasko ne tro facila, certe preskaŭ neebla por ne riĉa persono kiel mi estas. Por uzi la originalajn manuskriptojn, mi devintus peti la koncernajn permesojn kaj veturi al Escorial (Madrido), Kairo, Bagdado, Damasko kaj aliaj ne tiel konataj urboj de la mondo. Ne vane oni verkis

ĝis nun multnombrajn monografiojn pri la temo, aŭ eble pro tio, sed fakte neniun antologion en ajna moderna lingvo laŭ la karakterizoj de tiu ĉi libro. Cetere, krom multe da mono, mi ankaŭ bezonus pli da tempo ol tiuj tri jaroj dum kiuj mi laboradis. Ĉu vi ne rimarkis, mia kara, ke ni parolas pri epoko antaŭ la naskiĝo de la nuntempaj modernaj lingvoj? Jes sinjoro, mi uzis diverslingvajn tekstojn.

2a respondo: Rilate al via aserto, ke ekzistas multe da idealigitaj bildoj en nia libro, vi devus aldoni ke ankaŭ ekzistas multaj krudaj kaj realaj priskriboj. Mi povas do certigi al vi ke ili ne estas frukto de la fantazio de la aŭtoro, sed deduktoj de realaj historiaj eventoj. Ĝeneraligi la tutan vivoperiodon de Al-Andalus en tiu frazo de vi citita per kiu komencas la Enkonduko de la libro, t.e. "ke Al-Andalus estis legenda lando kie regis Poezio kaj Amo okupis tronon" estas simpla dirmaniero kiu rigore ne kongruas kun la realo, ĉar tio signifus perfektan socion ĝis nun ne ekzistantan. Tamen se ni komparas Al-Andalus kun la ceteraj landoj el

Okcidento de tiu epoko, kie oni pensis nur pri bataloj, certe ni alvenos al tiu brila konkludo kaj sentos nin inklinaĵi uzi similajn frazojn. Mi invitas samideanon Golden analizi certajn viverojn de Al-Andalus por pravigi niajn emfazojn. Ekz. ĉu laŭlonge de tiu epoko (de la jaro 711 ĝis 1492) iu ajn lando de la mondo havis, ne nur tiom da poetoj sed eĉ de poetinoj kiel ekzistis en Al-Andalus? Ĉu ne estas emfazinde ke en Al-Andalus ekzistis, krom tiom da gepoetoj, tiom da matematikistoj, astronomoj, filozofoj, kuracistoj, gramatikistoj kaj ĝenerale tiom da sciencistoj kiam en Okcidento la analfabetismo regis eĉ sur la tronoj? Kiom da tiamaj homoj posedis bibliotekon kiel tiun de la kalifo de Kordovo, Al-Hakam la 2a, kiu superis 400.000 volumojn? Sendube, vi perfekte scias ke estis ĝuste al-andalusanoj kiuj redifinis la grekan kulturon kaj disvastigis ĝin en Eŭropon. Kaj sub sociologia vidpunkto, ĉu ne laŭdindas ke pluraj minoritatoj kunvivadis harmonie dum pluraj jarcentoj en Al-Andalus? Tio tute ne signifas ke mi pretendis sanĝi la realon kaj idealigi ĉion, kiel vi efektive diras, sed estus pli racie, ke paralele al la substreko de la idealigitaj bildoj, kiujn vi elstarigas nur kiel erarojn, vi, s-ro Golden, substreku ankaŭ tiujn paragrafojn, kiuj espri-

mas situaciojn kontraŭajn, ekz. la terurajn bildojn de la Sevila reĝo al-Mutamid (1042-1068) aŭ la priskribita pogromo en la regno de Granado, kiam la veziro Yusuf Nagrella kaj pli ol 3.000 judoj estis kruele mortigitaj la 30an de decembro de la jaro 1066. k.a..

Ne, s-ro Golden, mi ne volis ŝanĝi la karakteron de la eventoj, tial, kvankam mia libro ne temas specife pri historio, mi penis prezenti kaj tion laŭdindan kaj tion repro-

ankaŭ ne ekzistas kronologia tabelo kun la nomoj de la regantoj kaj periodo de la regado. Efektive tiuj neekzistantaj detaloj, se kompletigitaj laŭ via sugesto kaj mia propra kompreno, tre utilis por eventualaj konsultoj. Sed mi ripetas, s-ro Golden, la libro ne temas pri historio. Ĝi ne estas konsultverko, sed simpla antologio, ĝis nun unika en siaj karakterizoj, kvankam mi priskribis ĝin kronologie kaj en kelkaj kazoj eĉ aldonis datojn kaj detalojn ne

mi trovos malavaran eldonanton de tiu manuskripto, vi povos legi tiun verkon en la hispana lingvo kun la detaloj indikitaj. Fakte la verko ne preterpasas la limojn de la menciita tajfo, kio metis je mia dispono iom pli da spaco por prihistoriaj aldonoj.

4a respondo: Mi serioze dubas ke *Lirikaj perloj* estos denove eldonita en Esperanto. Konstatu ke ĝi estis jam dufoje eldonita. Mi mem unuc kaj poste la plej prestiĝa kultura aragona institucio



bindan, kvankam oni devas agnoski la staton de progreso kaj la pli altan nivelon de la civilizacio de Al-Andalus super la tiel nomita kristana civilizacio, kiu zorgis nur pri krucmilitoj, religio aŭ, je la nomo de la Evangelio, kiel pli efike amasbuĉadi...

3a respondo: Ja vi pravas kiam vi indikas ke en mia libro abundas tro da nekonataj nomoj en la araba lingvo, kaj ankaŭ mankas diversspecaj mapoj por montri la geografian situon de la abundo da toponimoj, la politikan kaj kulturalan etendiĝon de la regnoj kaj etnaj grupoj, kaj

kutimajn en lirikaj verkoj. Cetere, kelkaj el tiuj indikoj, t.e. mapetoj, genealogiaj detaloj de la reĝoj kaj aliaj komplementaj priskriboj, estis forigitaj de la definitiva teksto post repensado, unuc ĉar, kiel dirite, la libro volas esti nur lirika verko, kaj ankaŭ ĉar tiuj aldonoj signifis atendindan pliampleksigon de la teksto kaj sekve plialtigon de la eldonkosto... kaj mi ne estas riĉa homo.

Tiuj detaloj aperas en la hispanlingva teksto, kiun mi verkis en la lirika antologio pri la "sarakusta tajfo", ankorau ne eldonita. Eble, se iam

"Fernando el Católico" okupiĝis pri la sinsekvaj eldonoj, kaj oni ne povas ignori ke la nombro da esperantistaj legantoj estas iom malalta. Ni, la esperantisto, konsentas verki, t.e. labori senpage, sed la eldonantoj aspiras almenaŭ repreni la elspezitan monon kaj, se libro estis jam dufoje eldonita, oni malfacile povus lanĉi trian eldonon kaj forvendi la stokon, eĉ se la temo estas tiel originala kaj interesa kiel tiu de *Lirikaj perloj de Al-Andalus*. Cetere mi disdonis inter esperantistaj intelektuloj pli ol 300 ekzemplerojn, kaj tio, kom-

preneble, bremsas la vendadon ĉe tiu kolektivo, kiu fakte intereseĝas pri libro tute neordinara.

0 5a respondo: La nepra bezono —viaopinie— verki kompletan indekson de arabaj nomoj kun la ekvivalentaj asimilitaj formoj en eŭropaj lingvoj, per kiuj kelkaj el tiun grandaj poetoj, filozofoj kaj sciencistoj menciitaj en *Lirikaj perloj* estas pli vaste konataj en la monda kultura historio, ne estas —miaopinie— afero de eŭropaj lingvistoj sen partopreno de arabaj erudiciuloj plene regantaj sian antikvan beletron. La samon mi opinias pri la esperantigo de Al-Andalus kaj aliaj vortoj ofte uzataj en la verko. Ni esperu ke inter la novaj esperantistoj venu al niaj vicoj arabaj talentaj homoj plene regantaj la propran lingvon por fari tiun taskon! Kiam tiuj homoj alvenos en niaj vicoj, ili, eble kun ni, ja povos klarigi al vi per pli konvinkaj argumentoj ol mi disponas, ke tiuj arabaj nomoj, kiujn vi volas mallongigi aŭ traduki, estas afero ne tuŝebla, kvankam unu sola el ili okupu plenan linion. Inter pluraj eksplikoj, kiujn mi povas doni al vi, jen unu: franco posedas propran nomon kaj la familian patran nomon. Hispano posedas propran nomon, patran familian nomon kaj patrinan familian nomon. Arabo posedas propran nomon, genealo-

gian nomon tre ampleksan, kaj nomon kun indiko de profesio, ofte eĉ de la patro. En kelkaj kazoj mi provis mallongigi tiujn nomojn, sed mi estas konvinkita ke mi agis ne racie kaj ne montriĝis respektama kun la kutimoj kaj leĝoj de la arabaj popoloj. Do, se mi reeldonus mian verkon mi remetus la nomojn kompletajn. Jen kial la fama filozofo konata de skolastikoj per la nomo Avempace, arabe Ab_Bakr Muhammad ibn Yahya ibn *al-Sa'ig* ibn Bāijja respondas inter aliaj al la nomo “filo de arĝentjuvelisto”, kiun mi respektas akceptas kiel plian nomon. Ekzemple, mi mem, homo tute ne inklina al formalismoj, fakte ne tolerus ke ajna lingvisto, aŭ ne gravas kiu, kaprice forbalau de mia kompleta nomo la familian nomon de mia patrino. Eventuala mallongigo de nomo, por ĉviti ripeton ene de teksto, estas ja akceptebla, sed kripligo de nomo kiel ĝenerala normo estas netolerebla.

Sendube s-ro Golden, malgraŭ lia klereco, kiun mi agnoskas, tute ne konscias la problemojn de la diverslandaj arabistoj, kiam tiuj devas traduki arabajn terminojn al siaj respektivaj lingvoj, respektante kaj la sonon kaj gramatikon de sia lingvo, kio kaŭzas ke la traduknormoj en la franca, angla, germana kaj hispana, ktp. tute ne koincidas.

6a respondo: Mi petas senkulpigon al ĉiuj miaj legantoj pro tiuj eraroj facile korekteblaj, en kiuj mi ŝanĝas literojn en certaj vortoj de sama signifo kaj tial mankas la deviga unuformeco. Ofte tio okazis, ĉar la vorto havis malsaman version laŭ la tiama lingvo de Al-Andalus en kiu ĝi estis skribita: romanco, araba aŭ hebrea, kvankam nur mi kulpas, ĉar, krom la esperantlingva korektado, mi devus esti postulinta ankaŭ aliajn fakajn korektojn. En la vorto “moaŝaho” prezentita de s-ro Golden, la arabistoj solvas la problemon skribante la vorton arabe: muwaŝŝaha, kaj punkto. Sed, mi ripetas, ĉikaze nur mi kulpas, ĉar mi tradukis vorton sen ĝisfunda analizo de ĝia pluraspekta signifo. Senkulpigu min do!

Prave vi ankaŭ plendas, s-ro Golden, pro manko de kompletaj referencoj de kelkaj konsultitaj verkoj aperintaj en la 3a apendico. Jes, mankas referencoj kaj eĉ kelkaj titoloj, ĉar mi nur indikis la plej gravajn el ili. Kiel supre dirite, oni devis ŝpari paĝojn, sed mi promesas nepre respondi perletere al ĉiu leganto, kiu deziros ricevi aldonajn referencojn de la libroj de mi konsultitaj.

7a respondo: Mi envias vin, s-ro Golden, ĉar vi kurage opinii, kaj eĉ doni definitivajn solvojn al problemoj kiuj vi, sendube, ne bone ko-

nas: kalifejo? kalifujo? Vi pretendas per aktualaj analizelementoj difini per vortoj konceptojn tre kompleksajn sen eniri en la spiriton kaj penson de tiu epoko: ekz. la kalifo de Kordovo loĝis en tiu urbo, jes, sed ankaŭ en Madinat al-Zahra, aŭ ne gravas kie ene de la al-andalusa teritorio, ja la kalifo, kiel heredanto de Mahometo sendita de Alaho, ne povis havi rezidejon, nek registemon, nek doktrinon, ĉar li estis suverena super ĉiu kaj ĉio. La vorto devenas el epoko kies spiriton ni devus analizi antaŭ ol kuraĝi traduki. En tiu artikolo de *Kajeroj*, aludita de s-ro Golden, mi koincidas kun li nur rilate al la kon-

kludo, t.e. “ke la redakcio de la nuntempe reviziata PIV kaj ankaŭ kompilantoj de aliaj Esperanto-vortaroj kaj konsultlibroj ĝustigu la difinojn de kalifo kaj de ĉiuj aliaj vortoj devenantaj de tiu radiko”. Pri tiu konkreta vorto mi plene fidus je la kapablo de la paro F. de Diego — A. Valen, kiu kompilas Hispanan-Esperantan Vortaron.

Fine, mi rimarkas ke s-ro Golden ne ŝatas la araban beletron, “ĉar la samaj temoj kaj tropoj konstante reaperas”. Kompreneble neniu estas devigata akcepti belon laŭ difinitaj formoj. De la naskiĝo de la araba belestro oni konstatas la intensan regadon de la aspekto lirika.

Tiu konstanta serĉado de metaforoj donas al tiu liriko formojn tute originalajn, en kiuj regas la ornamo esprimon, tre adekvatan por anekdota verkado kiel ĉe la rakonto kaj la novelo, kaj tamen ne oportuna ĉe la dramo kaj la epiko. La orienta fantazio de la arabaj popoloj donas al ties belestro brilon senegalan kaj neimageblajn aperceptojn pri la mondo kaj la vivo, kvankam mi perfekte komprenas ke homoj inklinaĵ al racia pensado, kaj al la mondo de la ideoj, ne sentas la allogon de la araba belestro. Dankon, s-ro Golden pro via kritiko kaj inteligenta analizo de mia libro. Dankon!

Nekrologo

Julio J. Juanes Sainz forpasis la pasintan 26an de Majo en Algorta (Vizcaya), kiam li aĝis 77 jarojn. Esperanta memlerninto, li aktivis kiel membro de la Bilbao-a Grupo ekde 1953, kiam komencis nova laŭleĝa etapo, kiel estrarano kaj tuj kiel instruanto, laboro kiun li ekzercis dum multaj kursoj.

Li preparis kaj dissendis radio-programon “*Esperanto sur la anteno*” per “Radio Bilbao”, disaŭdigita tra Eŭropo de 1953 ĝis 1966.

Aŭtoro de la esperanta lernolibro “*Metodo Bilbao*”, uzata en niaj kursoj dum multaj jaroj. Alloga preleganto, li partoprenis multajn debatojn inter kleruloj kaj reprezentis nian Grupon okaze de kongresoj kaj kunvenoj. Speciala laboro dum la UK de Madrido en 1968, kiel deĵoranto de la gazeta informado.

Verkanto de la esperanto-teatraĵo “*Kiam Karla alvenis*”, unufoje prezentata pere de membroj de la Grupo de Bilbao dum la zamenhofaj festoj de 1972.

Kiel poeto li ricevis premiojn en la 19aj Internaciaj Floraj Ludoj de Rubi en 1979, samkiel en Reus (22aj Floraj Ludoj de 1982) kaj en Sant Cugat del Valles (25aj Floraj Ludoj de 1985), premio aljuĝita al lia verko “*Poezio simpla por edzino klarokula*”, kies kortuŝa deklamado oni aŭskultis emocie kaj ricevis grandan ovacion.

La 8an de novembro 1996a kunsidis la membroj de la Patronaro, D-ro Victor Ortíz, S-ino Pilar Sancho kaj s-ro Enrique Piquero. La sekretario, s-ro Piquero informis pri la poentoj asignitaj de ĉiu membro de la juĝkomisiono, respektive s-ro Antonio Valén, S-ro Miguel Fernández kaj s-ro Miguel Gutiérrez.

La adicio de la respektivaj poentoj donis la premion al la traduko de la novelo "Pri la kanto de l' eternaj akvoj" de Miguel de Unamuno, pseŭdonime subskribita de «Jozefo Spertoza».

Malfermite la koncernan identigan koverton, la sekretario informis ke la premio (15.000 pesetoj por aĉetado de libroj ĉe la HEF-libroservo) estas aljuĝita al la tradukisto:

S-ro Josemari Sarasua (Bilbao)



La patronaro de «Fundación Esperanto» dankas al ĉiuj partoprenintoj pro ilia entuziasma klopodo viviĝi esperanton per siaj tradukoj, kaj al la juĝintoj, kiuj unuanime montris sian kontenton pro la ĝenerale alta kvalito de la tradukoj ricevita, kiuj postulis penegan laboron por veni al findecido. Certe bona rikolto por estontaj volumoj de la libro-kolekto *Hispana Literaturo*, eldonata de HEF.

Zaragoza, la 8an de novembro de 1996a

Enrique Piquero

Sekretario de «Fundación Esperanto» kaj de la Konkurso

Perkoresponda Kurso



Lernolibro: Esperanto, curso del idioma internacional; **ekzercaro** (presitaj aŭ en disketo); **informlibro:** El Esperanto: fenómeno de la comunicación; **vortaro** Lexicón Sopena; **kasedo** kaj la gvido de kompetenta instruisto jen telefone, jen fakte, jen per normala aŭ elektronika poŝto.

nur 14.900 ptojn*

Ĉiu kursano ricevos senpage dum unu jaro la koncernajn publikigaĵojn de la Asocio: Boletín, Juna Amiko, Konkize kaj Kontakto.

Mendu ĝin ĉe HEF, Rodríguez San Pedro 13-3-7a, ES-28015 Madrid.
Tel+Faksilo: 34(9)1-4468079; esperanto@adv.es

* Remburse plus sendokostoj. Gejunuloj kun "Carnet Joven" ricevas 10 elcentan rabaton.

